La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-11-19 n-ro 360

# Insulo Lesbo: Ĉu «nova Gvantanamo»?




## Fermiĝis la Bonna konferenco de UN pri klimata ŝanĝiĝo

## Mugabe estas postulata eksiĝi

## Kvinmonata aventuro de perdiĝintoj en la Pacifiko feliĉe finiĝis

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

Insulo Lesbo: Ĉu «nova Gvantanamo»?
*5 500 personoj amasiĝas ĉi tie, dum la kampadejo povas nur akcepti duonon p. 03*

Fermiĝis la Bonna konferenco de UN pri klimata ŝanĝiĝo
*Pozitivaj fruktoj p. 04*

MUGABE estas postulata eksiĝi
*Dek provincaj sekcioj de la partio postulas ke MUGABE eksigu p. 04*

Pollando kunlaboras en PESCO
*Kaj 22 aliaj uniaj landoj p. 05*

Truego aperis surgrunde en brazila bieno
*Dolino p. 05*

Kvinmonata aventuro de perdiĝintoj en la Pacifiko feliĉe finiĝis
*Feliĉe ili havis akvosensaligilojn kaj rezervon de manĝaĵoj p. 06*

Imitado vekas simpation
*Sociaj kameleonoj p. 07*

# Insulo Lesbo: Ĉu «nova Gvantanamo»?

5 500 personoj amasiĝas ĉi tie, dum la kampadejo povas nur akcepti duonon. De la 15a de aŭgusto ĝis la 10a de novembro, ĉirkaŭ 7 000 rifuĝintoj alvenis sur la grekaj insuloj de Lesbo [Mitileno], Ĥio kaj Samoso. La greka registaro spertas premon. La opozicio kaj la NROj asertas, ke la registaro volas lasi la migrantojn sur tiuj insuloj. Ili denuncas [kondamnas] tion, kion ili nomas «stokejoj de animoj». La ministrejo pri migradoj neas iliajn akuzojn kaj, de tempo al tempo, translokas la plej vundeblajn personojn al Ateno.




Hieraŭ vespere, trideko da rifuĝintoj, plejparte virinoj kaj infanoj, estis delokitaj per buso kaj ŝipo al Ateno. Sed tiuj, kiuj restas tie priskribas la kampadejon de *Moria* kiel «surteran inferon»:

En la angla, Sami Al-Bayati, iraka rifuĝinto, 20-jara, eksplikas:

«*Moria* ne bonas, mi volas iri al Ateno. Ĉi tie, ni havas nek domon, nek monon. La nutraĵo ne estas bona kaj ni havas ĉiutage po nur botelon da akvo. Nur unu hodiaŭ!»

Plejparto de la homoj perdis sian lastan esperon. Kelkaj estas tie de antaŭ 6 aŭ 8 monatoj, eĉ jaro.

Ili pacience atendas respondon al sia azilpeto, kaj frontas samtempe neelteneblajn vivkondiĉojn.

Wasim Shahnawaz, afgana rifuĝinto, 36-jara, lanĉas helpalvokon: «Vi helpu nin, vi ne lasu nin morti en tiu malliberejo, kio la kampadejo de *Moria* ja estas . Mi volas paroli al vi pri la necesejo. Mi scias, ke tio estas maldeca, sed ĉi tie akvo kaj purigado ne ĉeestas. Ĉiuj ĉi homoj vivas kiel mortintoj».

Tiuj rifuĝintoj ĉefe protestas por postuli plibonigon de siaj vivkondiĉoj. Aliro al la kampadejo de *Moria* ne estis permesita al la teamo de raportistoj.

«Dum la lasta monato, estis tre malfacile por televidaj kameraoj eniri en la kampadejon de *Moria*. Tamen la rifuĝintoj proksimiĝas al la ĵurnalistoj por interparoli kun ili pri siaj neakcepteblaj vivkondiĉoj. Tion ili ripetas, nur forlasi tiu insulon, ili deziras», konkludas Apostolos Staikos.

Neniam Milito Inter Ni

# Fermiĝis la Bonna konferenco de UN pri klimata ŝanĝiĝo

La Bonna konferenco de UN pri klimata ŝanĝiĝo, kiu laŭplane devus esti finita la 17an de novembro, fermiĝis frumatene de la 18a en la urbo Bonno, Germanio. Post la konferenco XIE Zhenhua, la ĉina speciala reprezentanto pri klimata ŝanĝiĝo, diris, ke Ĉinio bonvenigas kaj subtenas la aron da pozitivaj fruktoj akiritaj en tiu ĉi konferenco, en kiu formiĝis la tekstaro de ekvilibra intertraktado pri diversaj problemoj koncernaj al la plenumado de la "Pariza Interkonsento", plie preciziĝis la organiza metodo por la progresiga dialogo de 2018, kaj precipe, akceptiĝis la serio da aranĝoj por rapidigi la plenumadon antaŭ la jaro 2020.




XIE Zhenhua [ʕXiězhènhuá 解振华 ] rimarkis, ke la fruktoj de la bonna konferenco reliefigis kaj firmigis la politikan dinamikon de la internacia kunlaboro, respondi al klimata ŝanĝiĝo kaj akceli la verdan kaj malaltkarbonan evoluigon en la mondo. Kvankam ekzistas io kio ne plaĉas al homoj, tamen la zorgoj el diversaj partioj estas ekvilibre prezentitaj.

Diversaj partioj donis al Ĉinio altan takson pro tio, ke Ĉinio aktive agas por respondi al klimata ŝanĝiĝo kaj ke la ĉina delegacio ludis pozitivan rolon en tiu ĉi konferenco.

Xiong
Ĉina Radio Internacia

---

# MUGABE estas postulata eksiĝi

Vespere de la 17a de novembro loka amaskomunikilo raportis, ke dek provincaj sekcioj de la reganta partio, t.e. la Zimbabva Afrika Nacia Unio – Patriota Fronto, deklaris, postulante, ke Robert Gabriel MUGABE, la prezidanto kaj la unua sekretario de la partio kaj la prezidento de Zimbabvo, eksiĝu [abdiku].



Laŭ la raporto, la dek provincaj sekcioj de la partio postulas, ke MUGABE eksiĝu sin de la posteno ene de la partio kaj la registaro, ĉar li jam "perdis sian regpovon super la partio kaj la registaro". Intertempe ili proponis, ke la Centra Komitato de la Zimbabva Afrika Nacia Unio – Patriota Fronto okazigu al si apartan kunvenon en la 48 horoj kaj faru alĝustigon interne de la partio.

En la 17a de novembro MUGABE prezidis la diplomiĝan ceremonion de la Zimbabva Malferma Universitato en la ĉefurbo Hararo. Tio estas la unua fojo, ke MUGABE, post la tumulto en Zimbabvo, partoprenis en publikaj aktivecoj, sed en la ceremonio li ne donis paroladon.

Xiong
Ĉina Radio Internacia

# Pollando kunlaboras en PESCO

Pollando kaj 22 aliaj uniaj landoj sciigis lastlunde [13 nov 2017] pri aliĝo al Konstanta Struktura Kunlaboro [angle **Pe**rmanent **S**tructured **Co**operation - PESCO] koncerne defendon kadre de la Eŭropa Unio. Ĉi tiuj ŝtatoj alprenis konkretajn devontiĝojn por firmigi siajn defendkapablojn.



En la nomo de Pollando subskribojn metis la ministroj por la defendo kaj por la eksterlandaj aferoj. La polaj politikistoj aldonis al sia sciigodeklaro leteron, en kiu ili akcentis, ke la kunlaboro kadre de la Unio ne povas dubli NATO-on nek kun ĝi rivali kaj la kunlaboro kadre de PESCO devas konsideri minacojn venantajn de ĉiuj direktoj. Samtempe kun la subskribo de la deklaro ŝtatoj aliĝintaj al PESCO alprenis konkretajn devontiĝojn pri plukonstruo de defendprogramoj aŭ entreprenado de eksterlandaj operacoj.

La decido malfermas vojon al formala funkciigo de la strukturo en decembro. La ŝtatoj-membroj prezentis ĝis nun pli ol 50 konkretajn projektojn same pri la kapablo kiel ankaŭ pri opercoj mem realigotaj kadre de PESCO.

Pola Retradio

---

# Truego aperis surgrunde en brazila bieno

Laŭ Vikipedio "dolino estas tersurfaca funelforma tersubiĝo, tipa en karstaj regionoj. La diametro kaj profundo de la dolinoj estas tre varia".



Ĉi-monate geologistoj de **U**niversitato **F**edera de **U**berlando (UFU) ekesploris aperantan dolinon en bieno sur la municipo Koronel-Fabrisiano, subŝtato Minas-Ĵerajso en Brazilo. Tiu kavaĵo en la supro diametras ĝis nun ĉirkaŭ 30 metrojn.

Adriano Rodrigues DOS SANTOS, profesoro de UFU, klarigis, ke dolinoj estiĝas per grada dissolviĝo de kalkoŝtonoj, kiuj oftas tiuregione. Tamen en tiu bieno tiu dolino subite aperis, allogante atenton de fakuloj.

De nun, laŭ Adriano, la bienposedanto alvoku terfizikon aŭ geofizikon cele al kontrolado de la dolino ĝis ties stabiliĝo.

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog

# Kvinmonata aventuro de perdiĝintoj en la Pacifiko feliĉe finiĝis

Du virinoj el *Honolulu*, Havajo eksentis sin trankvilaj kiam ili kaj iliaj hundoj estis savitaj post kvin monatoj de perdiĝo en ŝarkoplena oceano. Ĝenifer Appel kaj Taŝa Fuiava ekflosis de Tahitio la 3-n de majo, sed frontis paneon de movigilo pro ŝtormo. Feliĉe ili havis akvosensaligilojn kaj rezervon de manĝaĵoj kaj hundonutraĵon por la tuta jaro. Ĉi-bazaj rezervoj ebligis ilin resti vivaj dum sufiĉe longa tempo trovote de Tajvana fiŝkapta ŝipo proksimume 900 mejlojn for de Japanio.



Sekvintan tagon matene, post kiam la ŝipeto de la virinoj estis trovita, la Usona militŝipo *Aŝland* savis ilin. Sinjorino Appel diris: "Mi estas danka pro ilia servo al mia lando. Ili savis niajn vivojn. Fiero kaj ridetoj, kiujn ni spertis vidinte aperintan militŝipon estis vera feliĉo."

Malpli ol post unu monato post sia ekfloso el Tahitio ili frontis malbonan veteron. Telefoni por peti helpon ne eblis, ĉar la sola telefono hazarde dronis en la maro jam en la unua tago. Dum longaj 5 monatoj ili drivis en la Pacifiko, sendante plagsignalojn kaj atendante helpon. "Tio estis tre malĝojiga kaj senesperiga afero", diris Appel. "Ĉio, kiun vi povas fari estas uzi kion vi povas kaj havas. Vi ne havas alian opcion."

Eblas kredi aŭ ne kredi, sed limigita rezervo de manĝaĵo ne estis la plej granda problemo. La ŝipeto estis ĉiam ĉirkaŭita de ŝarkoj. "Ni malrapide flosis tra ilia loĝspaco. Ili venis por montri sin kaj rememori al ni, ke ni devas daŭrigi nian batalon." - diris Appel. "Ili decidis uzi nian ŝipeton por instrui siajn ŝarkidojn pri kiel indas ĉasi. Ili atakis nokte."

Post kiam Fuiava kaj Appel estis albordigitaj al *Aŝland*, ili ricevis medicinan helpon. Ili restos en la militŝipo ĝis kiam ĝi atingos la sekvan havenon.

La komandoro Stiven Ŭotson, la komandanta oficiro de *Aŝland* diris en sia deklaro: "La Usona militfloto havas devon helpi al ajna suferanta maristo de ajna nacieco en ajna situacio."

Kirill Noviĉenko
Interalie

# Imitado vekas simpation

Simila rideto, la sama korpa sinteno: Kiu dum konversacioj imitas la gestojn kaj la mimikon de sia vidalvidulo, tiu aperas aparte simpatia. Aliflanke tia konduto havas ankaŭ malavantaĝon.

Kiu imitas aliajn homojn ĉe interkonatiĝo, tiu vekas simpaton - almenaŭ ĉe anoj de la sama sekso. Tiun rezulton atingis nova studaĵo de universitatoj en Berlino kaj Lepsiko.



Laŭ tio ekzistas "sociaj kameleonoj", nome homoj kiuj aparte ofte imitas aliajn. "En nia studaĵo ni povis montri ke tiu imita konduto kondukas al pli da simpatio por tiu socia kameleono", klarigas psikologino de la universitato de Lepsiko.

En analizo kun entute 139 partoprenantoj la sciencistoj esploris laŭ sekse apartigitaj grupetoj kiel la subkonscia imitado de kondutoj, korpaj sintenoj, gestoj, vizaĝesprimoj aŭ lingvouzo efikas al la interkonatiĝo. Tiun fenomenon kiu estas konata ankaŭ kiel kamufla imito la esploristoj analizis helpe de videoregistraĵoj.

En la eksperimento renkontiĝis anoj de la grupetoj por mallongaj interkonaj konversacioj. Antaŭe kaj poste la partoprenantoj diris kiel simpatia ili trovis sian koncernan kunparolinton. Kandidatoj kiuj jam post la unua impreso sentis simpation por sia kunparolanto, transprenis dum la konversacio krome pli ofte kondutmanierojn kaj esprimojn.

"Per kamufla imito ni komunikas senkonscie ke ni ŝatas iun kaj per tio povas ankaŭ mem esti pli ŝatataj", diras psikologino el Berlino. Kiu jam ĉiukaze sentas simpation, tiu adaptiĝas pli forte al sia vidalvidulo.

Subkonscia imitado tiel verŝajne povas helpi, konstrui ligojn al aliaj homoj. Sed ekzistas ankaŭ kontraŭefiko. Laŭ nederlanda studaĵo el la jaro 2009 homoj kiuj imitas aliajn, povas esti trompataj pli facile de aliaj.

En tiu studaĵo kun 92 partoprenantoj la sciencistoj starigis tiam du grupojn. La anoj de la unua grupo ricevis etan monsumon kiun ili tenis por si mem aŭ donacis por bonfara celo. Sekve ili donis al anoj de la dua grupo - foje laŭvere, foje laŭmalvere - informon pri tio kion ili estis farintaj pri sia mono.

La aŭskultantaro estis denove dividita. Unu duono ricevis la taskon imiti. La alia duono devis konscie eviti tion. Sekve la aŭskultintoj devis prijuĝi, ĉu oni rakontis al ili la veron. En tio la partoprenantoj kiuj plejgrandparte estis rezignintaj pri imitado, pritaksis siajn kunparolintojn plej ofte pli realisme.

"Kamufla imitado plifaciligas al ni kompreni kion aliaj homoj sentas", skribas la sciencistoj. Kie tamen la konduto de la kunparolanto ne kongruas al ties veraj emocioj, tie la afero estas inversa: "En la kazo de trompaj mesaĝoj kamufla imitado malebligas tiun emocian komprenon."

Esperanta Retradio